La Hodiaŭa Ĵurnalo
2018-01-29 n-ro 431

# Korprema efiko ĉe suĉinfanoj



Davoso: la civitana socio unuiĝas por liveri aŭdacan mesaĝon ĉe World Economic Forum

Okazis la plej granda ŝtelo en la historio de ĉifromonoj

Sukcesoj de akustika levitacio montras novajn perspektivojn

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Davoso: la civitana socio unuiĝas por liveri aŭdacan mesaĝon ĉe *World Economic Forum*
*La ekonomia sistemo estas malsana p. 03*

Korprema efiko ĉe suĉinfanoj
*La korpremado de suĉinfanoj povas grave influi ilian postan vivon p. 04*

Okazis la plej granda ŝtelo en la historio de ĉifromonoj
*534 milionoj da usonaj dolaroj p. 04*

Sukcesoj de akustika levitacio montras novajn perspektivojn
*Stabila akustika levitacio por objekto, kiu estas pli granda, ol longeco de sona ondo p. 05*

Mediprotektaj bambuaj produktoj el Ĉinio
*Ĉinio havas pli ol ses milionojn da hektaroj de bambuaj arbaroj p. 06*

Kia estas la homo?
*Ĉiuj homoj naskiĝas liberaj p. 07*

Hodiaŭe
*Anton Ĉeĥov; Emanuel Swedenborg; Lidja Zamenhof; Romain Rolland; kaj Nokta Papilio p. 08*




# Davoso: la civitana socio unuiĝas por liveri aŭdacan mesaĝon ĉe *World Economic Forum*

Sur flanko de monto sufiĉe proksime de *World Economic Forum* (WEF), aktivistoj de *Greenpeace* elsendis mesaĝojn de *Amnesty International*, *Public Eye*, *Attac* Svislando, Iniciativo por respondecaj multnaciaj entreprenoj, *Greenpeace* kaj aliaj organizaĵoj.

La mesaĝoj postulas (naive-NDT) de la membroj de la politika kaj ekonomia elito, ke ĝi ŝanĝu la maljustan ekonomian sistemon, kiu pligravigas la neegalecojn, endanĝerigas la medion kaj minacas la homajn rajtojn.

«Ĉiuj niaj mesaĝoj ilustras la saman realecon», eksplikas Jennifer Morgan, ekzekutiva kundirektorino de *Greenpeace*-Internacia. «La ekonomia sistemo estas malsana. La entreprenoj amasigas profitojn de aktivecoj, kiuj detruadas la medion, aŭ atencas la homajn rajtojn, tio devas ĉesi».

En Davoso, la civitana socio kondamnis multajn misfunkciadojn. La raporto de *Greenpeace* titolita «*Justeco por la popoloj kaj la planedo. Ĉesigi la epokon de dependeco, koluzio kaj nepuniteco de la entreprenoj*» analizas 20 specifajn kazojn, en kiuj la politikoj de entreprenoj atencis la medion kaj homajn rajtojn. Ĝi ankaŭ entenas 10 simplajn principojn por reformi la ekonomian sistemon (ligilo en la franca; ligilo en la angla).

«La prezidento de Usono, kiu ĉi-jare partoprenis al la WEF, estas simbolo de la drivoj de la nuna ekonomia sistemo, kiu favoras la poluistojn kontraŭ la planedo», aldonas Jennifer Morgan. «Estas tempo por la elito grupigita ĉe la WEF pripensi serioze nemalhaveblajn fundamentajn ŝanĝojn por rapide atingi mondon vivopovan por ĉiuj»

Neniam Milito Inter Ni

# Korprema efiko ĉe suĉinfanoj

La korpremado de suĉinfanoj povas grave influi ilian postan vivon. La lastaj esploroj en la Universitato de Brita Kolombio elmontras, ke tuŝo povas influi sferojn de DNA, ligitajn kun la imuna sistemo kaj metabolo. La daŭro de la korpremado de infano en la beba periodo povas ŝanĝi genekspresion almenaŭ en 5 fragmentoj de ilia DNA.



Dum la esploroj estis pruvite, ke suĉinfanoj, kiuj spertis malpli proksiman fizikaj kontakton en la unuaj vivsemajnoj havis en siaj ĉeloj malpli forte evoluintan molekulan profilon. La eksperimenton partoprenis la gepatroj de 94 infanoj, kiuj gvidis taglibron dum 5 semajnoj ekde la naskiĝo de ilia infano. Ili notis kiel kondutas la infanoj, kaj ankaŭ kiom ofte estas tuŝataj kaj korpremataj. En la aĝo de 4-5 jaroj la provaĵoj de DNA de ĉiuj infanoj estis subigitaj al ekzameno. Esploristoj aparte donis la atenton al la mutilado de DNA, kiun povas influi eksteraj kondiĉoj, aparte infanaĝe.

Evidentiĝis, ke aperas konstantaj diferencoj en DNA-mutilado en kvin specifaj lokoj de DNA inter infanoj kun alta kaj malalta nivelo de la fizikaj kontaktoj. Du el ili gravas por la imuna sistemo kaj en metabolo. Estas planitaj pliaj esploroj por profundigi konojn pri la signifo de la fizika kontakto bebaĝe, aparte kaze de infanoj spertantaj malfacilan situacion.

Pola Retradio

# Okazis la plej granda ŝtelo en la historio de ĉifromonoj

En Japanlando kaj Azio la firmao *Coincheck* staras inter la ĉefaj platformoj pri negocado de ĉifromonoj, kaj ĝi anoncis, ke ĝi konstatis nerajtigitan aliron al sia sistemo okazinta vendrede frumatene, la 26-an de januaro.



Tiom da ĉifromono *NEM* – samkvante al ĉirkaŭ 58 miliardoj da japanaj enoj – malaperis pro supoza komputila atako. Tio estas 534 milionoj da usonaj dolaroj.

Post la anonco la respondeculoj pri tiu monŝanĝejo raportis la aferon al la japana agentejo pri financaj servoj, kaj kelkatempe ĉesigis ĉiujn servojn: deponado, deprenado, vendado kaj eldonado pri *NEM*, aliaj ĉifromonoj kaj enoj.

KOICHIRO Wada, la prezidanto de *Coincheck*, pardonpetis dirante, ke la firmao intencas iamaniere kompensi siajn klientojn.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Sukcesoj de akustika levitacio montras novajn perspektivojn

Esploristoj el la Bristola Universitato (Britio) la unuan fojon sukcesigis stabilan akustikan levitacion por objekto, kiu estas pli granda, ol longeco de sona ondo. Principe ĉi-aliro estas aplikebla por levi en aeron objektojn, kiuj havas dimension ĝis tiu de homo. La koncerna artikolo estis publikigita en la revuo *Physical Review Letters*.



Akustika levitacio estas stabila restado de objekto en la aero, subtenata per staranta sona ondo. Kutime la problemo de tiu ĉi aliro estas, ke la dimensioj de sonaj ondoj laŭregule estas malgrandaj, kaj la plej longaj ondoj (tio estas, infrasono) entute malfacile aplikeblas proksime al homoj, ĉar ili povas kaŭzi malfavoran efekton al organismo. La sonoj en aŭdebla parto de akustika diapazono ankaŭ ne estas la plej bona opcio por akustika levitacio, ja la ondoj kun bezonata energio estigos fortegan bruon. Pro tio la aŭtoroj de la nova esploro elektis por sia eksperimento sonajn ondojn kun frekvenco 40 000 hercoj, do tio estas ultrasono, kiu ne ĝenas la homon.

En la eksperimento oni sukcesis akustike levitaciigi ŝaŭmplastan globeton, kiu havas diametron je 1,6 centimetroj. Ĉiuj antaŭaj eksperimentoj pri akustika levitacio apenaŭ sukcesis haltigi objektojn kun diametro je unu aŭ du milimetroj. Do la dimensio de la objekto en ĉi-eksperimento estis jam je 1,88 fojoj pli granda, ol la longeco de la sonaj ondoj, uzitaj en la eksperimento.

Akustika levitacio de malgrandaj objektoj estas konsiderata kiel perspektiva por aro de specife puraj produktadoj, kiel ekzemple elektroniko. Tie ofte estas bezonata transportado de elektronikaj malgrandaj fragmentoj de duonkonduktantoj. Ajnaj firmaj manipuliloj povas damaĝi ilin aŭ meti polvon al ili ankoraŭ antaŭ ol la protekta tavolo estos metita sur ilin. Akustika levitacio ebligas eviti tion. Kiel opinias esploristoj, ilia nova aliro al levitacio ebligos levi en la aeron objektojn eĉ pli grandajn - ĝis homo.

Kirill Noviĉenko
Interalie

# Mediprotektaj bambuaj produktoj el Ĉinio

Ĉinio havas pli ol ses milionojn da hektaroj de bambuaj arbaroj, kiuj okupas kvinonon de la bambuaj arbaroj de la mondo.




Ĉinio ĉiujare produktas ĉirkaŭ 40 miliardojn da bambuaj manĝbastonetoj por unufoja uzado. Eĉ en la viglaj lokoj de Hongkongo, bambuaj skafaldoj estas uzataj en konstruado de altaj domoj.

**Verdaj bambuaj produktoj**

Krom esti farita el tradiciaj bambuaj metiartaĵoj, kun la helpo de moderna tekniko, bambuo estas ankaŭ trezoro por ĉiuj korpopartoj. Bambuo havas bonan ekonomian perspektivon. La jara produkto de bambua industrio valoras 200 miliardojn da juanoj. Unu el la kialoj estas konscio pri mediprotekto.

Bambu-planko el ĉinaj firmaoj okupas 90% de tiu en la internacia eksporta merkato. Pro pli da postulo pri verdaj produktoj en okcidentaj landoj, bambu-planko estas pli kaj pli ŝatata de konsumantoj. En 2016 la produktado de bambu-planko atingis 116 milionojn da kvadrataj metroj.

La interregistara organizo Internacia Reto por Bambuo kaj Rotango, kun ĉefstabejo en Pekino diris, ke bambuo, la renovigebla malaltkarbona materialo kaj alternativo al plasto kaj ligno, estas "unu el la avangardaj provoj de Ĉinio en mediprotektado". Bambuo povas liberigi grandan kvanton da oksigeno en la aeron, kaj ĝi kapablas sorbi karbonan dioksidon kvaroble pli multe ol iuj arboj.

Du aŭtofabrikistoj, *BMW* kaj *Lexus*, konsideras adopti la materialon kiel anstataŭanto de plasto kaj ligno por interna ornamo de aŭto. Iu germana kompanio volas uzi ĉi tiun materialon por fari ferdekon por ŝipo. Iu kanada kompanio pri kosma tekniko aldonos ĉi tiun materialon al teleskopo.

**Granda eksportanto de bambuaj produktoj**

Ĉinio fariĝis la plej granda eksportanto de bambuaj produktoj de la mondo. La jara produkt-valoro de la bambua industrio kalkuliĝas al 200 miliardoj da juanoj. La bambua industrio fariĝis nove emerĝanta de bambuaj kultivado, prilaboro kaj eksporto al bambua ekoturismo.

Laŭ "Disvolv-plano de Bambua Industrio de Ĉinio", en 2020 la totala produkt-valoro de bambuo de Ĉinio atingos 48 miliardojn da usonaj dolaroj, kaj 10 milionoj da homoj estos dungitaj por la industrio.

Liu Zijia
El Popola Ĉinio

# Kia estas la homo?

La kreinto de la leĝo – tiu, kiu regas la ŝtaton, leĝodonanto, ne povas forgesi, kia estas la homo. De kie ni scias, kia la homo estas? Kelkajn homajn ĝustecojn ni ja povas facile konstati. Ekzemple ni povas konstati, ke la homo vivas. Kiam la homo ne vivas, ni povas rimarki jam nur ties certan fizikan kaj kemian statojn. Kiam la homo vivas, unu estas bona, la alia malbona, povas esti saĝa aŭ stulta k.t.p. La homa kapablo por la vivo estas unu el tiaj ĝustecoj nomataj naturaj, ĉar ĉi kapablo devenas de neniu regado, de ajna homa dekreto, sed la homo vivas, ĉar tiel volis la naturo.



La alia ĝusteco homa, cetere same natura, ne devenanta de iu reganto, estas la kapablo de konscia elektado - „mi prenos tion, mi prenos alion", „mi faros tion, mi faros alion". La homo kapablas alpreni siajn decidojn memstare kaj konscie. La homa specio ĝuste tial diferencas de la specio besta, ke bestoj ne faras same memstarajn kaj konsciajn elektojn, kvankam kelkfoje povas ŝajni al ni, ke iu besto faras ion konscie, kaj laŭplane. Neniu besto ĝis nun diris al ni, do ni ne scias tion. Tamen la bestoj vivas kaj vivas la plantoj.

La homo posedas ankoraŭ alian ĝustecon – li kapablas krei riĉecon kaj disponi pri ĝi.

La ĝusteco karakterizas nur la homan specion. Verdire bestoj ankaŭ ion faras, sed ili faras tion instinkte, do ne ekzistas ĉe ili tia diverseco pri la formoj de riĉeco kaj pri ĝia dispono, kiel tio okazas ĉe la homa specio. Danke al tiu ĉi ĝusteco verŝajne ekestis la civilizacio en la formo, kiu estas al ni konata.

Finfine la homo scipovas admiri ĉiuspecan belecon. Tiu ĉi ĝusteco, estas tre grava eco de la homo, ĉar la tuta kulturo apogas sur ĝi. Se homoj ne posedus tian kapablon, ekestus neniu kulturo, ĉar la fonto de kulturo estas la homa impresiĝemo.

Jen do ni havas la tutan katalogon de la naturaj ĝustecoj, kiuj estis okazigitaj de neniu rego, de nenies kompetencoj - tial neniu reganto povas ilin nuligi!

La antikvaj Romianoj estas la aŭtoroj de jena sentenco: kiu konstituis, tiu povas senvalidigi. La naturajn ĝustecojn neniu aŭtoritato povas nuligi, ĉar ĝi ne kreis ilin!

Tamen ni nun volas traduki la menciitajn naturajn ĝustecojn en la lingvon de la leĝo.

La vivo estas tre facile tradukebla en la leĝan lingvon, ĉar la juĝo facile sukcesas okupiĝi pri tiu nocio kaj uzas en la praktiko ties neŝanĝitan nomon. Laŭvice la kapablo de konscia elektado laŭleĝe nomiĝas libereco. Kiam ni estas liberaj, ni povas konscie elekti. La kapablo krei riĉecon kaj pri ĝi disponi portas la leĝan nomon propreco. Fine la

kapablo admiri belecon ne subiĝas al la lingvo leĝa, eble bonŝance.

Ni do havas la katalogon de tri naturaj ĝustecoj, kiuj laŭ la interpreto de la leĝo nomiĝas vivo, libereco kaj propreco. Tiuj tri povas esti nomataj naturaj leĝoj kaj ili devus esti la fundamento de la leĝodonado, kiu nur tiam meritas nomiĝi vere laŭleĝa.

La leĝodonado devus esti almenaŭ ne malakorda kun tiuj naturaj leĝoj. Se la leĝo estos tamen malakorda, ĝi ne estos realigebla. Eĉ se ĝi estus tiakaze realigebla, ĝi estos maljusta.

En demokratio oni povas krei leĝojn, kiuj estas konformaj kun demokratio, sed ili tiam tamen „ne estas en ordo” - ĉar ili tiam bedaŭrinde ne kongruas kun pli supra ordo – kun la ordo de la naturaj leĝoj. Ni scias, aŭ almenaŭ devus scii, ke propreco, libereco kaj vivo tutsimple ekzistas, do tion oni povas per voĉdonado nek validigi, nek nuligi!

La agnosko de tiuj bazaj, naturaj ĝustecoj de la homo estas la mezuro de la ŝtato libereca kaj laŭleĝa. Anstataŭ tio, la ŝtatoj partiaj, pli aŭ malpli grandskale senigas siajn civitanojn unue je libereco, sekve je propreco kaj nemalofte eĉ je la vivo. Ĉu la nuntempa homo memoras ankoraŭ pri tio, ke ĉiuj homoj naskiĝas liberaj, kaj havas la saman rajton por vivi, libere kaj konscie elekti, por krei riĉecon kaj libere disponi pri ĝi?

Eble vi ankaŭ pri tio forgesis, kaj senproteste ofte ripetas: - „Mi nenion povas ŝanĝi, tiel jam devas esti...”

Andreo Bach
Esperanta Retradio



# Bildo de la tago

*Loxura atymnus*, Azio.

Vikipedio



## Anton ĈEĤOV

**Anton Pavloviĉ ĈEĤOV (ruse cirile Антон Павлович Чехов; naskiĝis la 17-an[jul.]/ 29-an de januaro 1860[greg.] en *Taganrog*, Rusio; mortis la 15-an de julio 1904 en *Badenweiler*, Germanio) estis rusa verkisto.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**

## Emanuel SWEDENBORG



**Emanuel SWEDENBORG (nomo denaske SWEDBERG, esperantigita formo de la nomo Emanuelo SVEDENBORGO) (naskiĝis la 29-an de januaro 1688 en Stokholmo - mortis la 29-an de marto 1772 en Londono) estis sveda filozofo, teologo, sciencisto kaj mistikulo.**

**En Esperanto aperis: *La dogmaro pri la vivo por la Nova Jerusalemo*.**

**Vikipedio**



## Lidja ZAMENHOF

**Lidja [Lidia] ZAMENHOF, la plej juna filino de la iniciatinto de Esperanto, L. L. ZAMENHOF, naskiĝis la 29-an de januaro 1904 en Varsovio, tiam en la Rusa Imperio. Ŝi estis agema antaŭeniganto de Esperanto kaj ankaŭ de homaranismo, tipo de religia kaj etika mondcivitaneco formulita fare de ŝia patro.**

**En Esperanto aperis: *Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj*; kaj pluraj tradukaĵoj.**

**Vikipedio**

## Romain ROLLAND



**Romain ROLLAND naskiĝis la 29-an de januaro 1866 en *Clamecy*, mortis la 30-an de decembro 1944 en *Vézelay* estis franca verkisto. En la jaro 1915 li gajnis la Premion Nobel de Literaturo.**

**En Esperanto aperis: *Al la Forbuĉataj Popoloj; Vortoj de Romain Rolland.***

**Vikipedio**